



SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio «Languedoc - Roussillon»

72, Avenue Général de Gaulle - 66000 PERPIGNAN (Pyrénées-Orientales)

JARA ABONO : 9 F.

C. C. P. 956-28 Montpellier

3-a Kvaronjaro 1977

N° 64

Ĉu vere ? Ĉu eble ?

En Heroldo de Esperanto (n° 12-13, paĝo 5) mi legas:

"Dum la Rejkjavika Kongreso ĉirkaŭ 70 personoj ĉeestis la kunvenon de la respondeculoj de la landaj Asocioj, kiun gvidis D-ro BORMANN. La rezultato de la debato, en kiu partoprenis 19 esperantistoj el deko da landoj, estis, ke nuntempe la idealoj ne plu estas allogilo por homoj kiuj deziras lerni Esperanton. Al la novaj lernantoj oni devas proponi aplikon de la ~~lingvo~~ ^{la cetera} lingvo kaj servon, kiel faras UEA pere de la jarlibro, delegita reto, kongresoj, k.t.p."

Ĉu vere ?

NI do ne plu estu idealistoj, ni estu realistoj. Kaj tiun realismon ni konkretigu dank'al la jarlibro la delegita reto, la kongresoj kaj ĉefe la k.t.p. Se tiu plena korbo da eksterordinaraj realaĵoj vin ne kontentigas, provu eklerni alian planlingvon, kiu penos oferti al vi pli da kotopoj.

Ĉu eble ?

Ni ne plu estu idealistoj, ni estu praktikistoj, kaj tiun praktikismon ni konkretigu restante hejme kiam UK okazas en Ateno, Rejkjaviko aŭ Varna, sed sendante niajn gefilojn al Londono (kio cetere kostos al ni multe malpli), - malsatante PIV, Esperanto en perspektivo, Plena gramatiko, sed aĉetante ĉipajn anglolingvajn poŝlibrojn, - abonante Financial Times sed malestimante niajn gazetojn esperanto kaj Heroldo de esperanto.

Unuvorte tio signifas, ke por sekvi la rezulton de la debato gvidita de la ĝenerala sekretario de UEA, ni devas gardi nian monon anstataŭ ĝin sendi al Rotterddam.

Kiu do el la nuntempaj homoj povas ja kontesti, ke lerni anglan lingvon estas senlime pli servodona ol lerni Esperanton.

Vi bezonas servojn? Forlasu Esperanton kaj vin turnu al kiuj kaj al kio kapablas plej bone kaj plej malmultekoste vin servi. Sed malgraŭ kaj kontraŭ ĉi 70 kongresanoj babiltrompitaj, kiu povas dubi, ke se ni ne estus idealistoj ni ne estus esperantistoj, ĉar neatentante ĉiujn kaj ĉiajn batojn, Interna Ideo restas kaj restos en la koro de ĉiuj el ni.

Doktoro SALAN.

LA UNUJ PAŜOJ DE ESPERANTO EN NIA REGIONO KAJ KONTRIBUOJ SUR LA INTERNACIA KAMPO

La 21-an de majo 1887 (la 2-an de junio laŭ la nova kalendarstilo) la cara cenzuristo stampis la ruslingvan manuskripton de D-ro Esperanto per la jenaj vortoj: "permesite de cenzuro". La 14-an de julio (la 26-an de julio laŭ la gregota kalendaro) la cenzuristo ellasis la libron el la presejo. Tiu ĉi lasta dato estas do la naskiĝdato de Esperanto kiu, ĉi-jare, fariĝas 90 jara. Nia tuta gazetaro ne preteratentos tiun ĉi gravan daton kaj niaflanke ni volas ĝin rememori tra omaĝo al la pioniroj, kiuj enplantis Esperanton sur la teritorio de nia regiono.

Jam en 1895-1897 la plej eminenta franca esperantisto, de BEAUFONT, la "submajstro", interesigis pri Esperanto kelkajn nemultajn homojn de nia regiono. Tiuj unuaj nefirmaj paŝoj estis ege malfacilaj pro la fakto, ke la esperantistoj ankoraŭ ne sin strukturis: la asocioj kaj grupoj ne ekzistis, la lernmaterialo konsistis nur el broŝuretoj, eĉ la lingvo apenaŭ balbutis kaj la vortprovizo ne estis tre riĉa.

Dank'al la agemo de Gaston MOCH, kiu verkis propagandan broŝuron kaj jam multe verkis pri Esperanto en diversaj ĵurnaloj, esperantistiĝis Henri BEL, bibliotekisto de la universitato en Montpellier. Jam en septembro 1897 H. BEL verkis propagandajn artikolojn en "La Vie Montpelliéraine" kaj, iom pli poste, en "Le Petit Méridional".

Kiam kreigis la "Société Pour la Propagation de l'Espéranto" (SppE), en januaro 1898, H. BEL tuj fariĝas ano de la sesmembra komitato kaj multe prelegas ne nur en Montpellier sed en multaj urboj de la regiono: Nimes, Cette, k.a.

Senhezite ni povas diri, ke H. BEL estis la semanto de Esperanto en nia regiono.

En septembro 1899 aperis la nomo de Alphonse Carles, el Béziers, kiel membro-adepto de la SppE.

En decembro 1899 H. BEL aprobis far la komitato de la SppE programon por la fondo kaj organizo de esperantistaj kluboj. Post la tegmenta asocio SppE, la esperantistoj havos lokajn grupojn. Iom post iom strukturigas la movado.

Dank'al la klopodoj de H. BEL, en junio 1902, naskiĝis esperantista grupo en Montpellier.

Paul BOURJADE, vinberkulturisto kaj abelbredisto en Fleury d'Aude laboris por starigi "Societon por Internaciaj Rilatoj" (S.I.R.) celantan utiligi Esperanton en profitcelaj perkorespondaj rilatoj por sciencoj, komerco kaj industrio, vojaĝoj, kolektadoj, artoj, ktp.

S.I.R. naskiĝis fine de 1902 en la kadro de "Lingvo Internacia" unu el la ĉefaj primovadaj organoj.

La 18-an de majo 1902 "Le Petit Meridional" kaj "La Dépêche de Toulouse" anoncis, ke sekve de publika parolado de S-ro BEL aranĝita en Narbonne far S-ro BOURJADE, estas starigita esperantista grupo kun jama enskribigo de 60 personoj. La unua tasko de la nova grupo estos aranĝi kurson.

En 1901-1903 la adresaroj de Dro ZAMENHOF enlistigis nomon de homoj, kiuj ludis gravan rolon ĉu sur la loka kampo: Jeanne FLOURENS kaj de REY-PAILHADE en Béziers, Baron, instruisto kaj FRAITOT, kolegiestro en Perpignan, ĉu sur loka sed ĉefe sur internacia kampo: Dro FRUICIER, Generalo SEBERT, Rektoro BOIRAC, Profesoroj BOURLET kaj CART, Sacerdoto PELTIER kaj tre multaj aliaj.

Rektoro BOIRAC, edzigitita al katalundevena fraŭlino, ofte retroviĝis ĉe lia bofamilio en Salces tute apude de Perpignan.

En Céret, ne malproksime de Perpignan, instaligis tre agema junulo, Paul BERTHELOT. Dank'al la kombinita agado de BOIRAC kaj BERTHELOT esperantista grupo fondiĝis en Perpignan (1904) kaj Céret (1905).

Iom post iom "verdiĝis" la tuta regiono kaj lokaj grupoj fondiĝas: Béziers (marto 1904) plus "virina klubo" en decembro de la sama jaro, Cette (marto 1904), Agde (1903).

La movado trovis sian unuan "voĉdonemulinon" en la persono de J. FLOURENS kiu, sub la plumnomo "Roksano" verkis sennombrajn kronikojn pri modo, teatro kaj feminismo, skribis novelojn, komediojn kaj multe tradukis, propagandis kaj varbis. Pluraj el ŝiaj verkoj aperis broŝurforme kaj, de junio 1908 ĝis novembro 1909, ŝi ĉefredaktoris la tre interesan monatan fakrevuon: "Tra la filatelio". En 1910 ŝi estis nomita membro de la Lingva Komitato.

La 18-an de junio 1905, Paul BERTHELOT aperigis en Perpignan la unuan numeron de sia ĵurnalo "Esperanto". La sekvantajn numerojn li mem presis, en Céret. En 1906 la ĵurnalon li vendis al Hector HODLER kaj kiam U.E.A. estis fondita, en 1908, "Esperanto" fariĝis kaj ĉiam estas ĝia aprezata organo.

En 1905, al la organizantoj de la 1-a kongreso en Boulogne-sur-Mer, A. CARLES, el Béziers, sugestis la pridiskuton de kreo de esperantistaj "konsuloj" (ni nun parolus pri delegita reto) tra la tuta mondo. La ideo estis detale pristudita dum la 2-a universala kongreso en Genève (1906) kaj efektiviĝis je la fondiĝo de UEA, en 1908. Do ne estas strange, ke en la unua komitato (estraro) de UEA ni trovu la nomon de A. CARLES kiu aparte okupiĝos pri la esperantistaj konsuloj. Li rolis ankaŭ kiel "konsulo" por la urbo Béziers en la unua jarlibro de UEA kaj en la koncerna adresaro ni trovas ankaŭ la nomon de reprezentanto en Agde kaj Fourques (Or. Pireneoj).

Niaj "praaĵ federacianoj" povis delicomni la internacian etoson partoprenante la 5-an universalan kongreson, kiu okazis en Barcelono de la 5-a ĝis la 11-a de septembro 1909. La lastajn tagojn de aŭgusto 1909 Dro ZAMENHOF estis la gasto de Dro DOR en Lyon¹²¹ elveninte Barcelonon iom antaŭ la kongreso li estis trairinta, trajne, nian tutan regionon.

En Nîmes kaj la Gard-a departemento nur sporade aperis la nomo de izolitaj esperantistoj, sed grajnoj de "izoluloj" povas ankaŭ naski fruktodonan arbegon. Nia samideano Raymond LAVAL ŝuldas sian esperantistiĝon ĝusta al "izolita" fervorulo el Alais, jam en 1912.

R. LAVAL, membro de la nuna grupo de Nîmes, apartenas al la elstara "Literatura Komitato" de S.A.T. sub la plumnomo "VALO" tre abunde kaj altnivele, traduke kaj originale, li pliriĉigas la esperantistan verkaron.

Fine, en Nîmes, fondiĝis grupo gvidata de S-ro DAUPHIN, licea instruisto, kaj de S-ro CARLI, italdevena esperantisto, antaŭe loĝinta en Alais. Invitite en Alais, ambaŭ efike propagandis kaj Ernest LAUZE naskita en Anduze, esperantistiĝinta en Lyon kaj loĝanta en Alais, malfermis kurson kies plej fervoraj lernantoj kaj prak-

tikantoj estis R. LAVAL kaj lia patro. Tuj poste, grupo estis fondita en Alais kun prezidanto Sro BONNAURE, apotekisto, kaj vic-prezidanto Dro ZALEWSKI, poldevena kuro-racisto.

En 1913 izolita esperantisto en Sommières, Dro PAULET, kunvenigis la Gard-ajn esperantistojn.

En printempo 1914 okazis ĉe Pont du Gard komuna kunveno de la grupoj de Avignon, Arles, Nimes kaj Alais kaj, samjare, en Avignon, R. LAVAL kaj lia patro ricevis la "ateston pri kapableco" de la S.F.P.E.

Bedaŭrinde, en nia regiono, samkiel ĉie alie, la militdeklaro bremsis la antaŭeniron de la movado sed ne ĉiuj semoj perdiĝis.

La plej bela pruvo estas, ke ni ankaŭ estas esperantistoj.

Jean AMOUROUX.

INTERNACIA SEMINARIO SOCIO-LINGVISTIKO EN PERPIGNAN

Dela 18a ĝis la 31a de julio okazis en Perpignan, ĉe la Universitata Centro, internacia seminario socio-lingvistiko. Partoprenis 80 fakuloj el 12 landoj.

Dum ĝeneralala kunveno S-ro René Lléch-Walter parolis pri Kataluna lingvo sed li prezentis sin ne nur kiel kataluna parolanto sed ankaŭ kiel esperanta parolanto, delegito de U.E.A. kaj partoprenanto de multaj universalaj kongresoj sen interpretistoj.

Dum speciala kunveno li parolis pri Esperanto kaj skizis, ĉe la nigra tabulo, la esperantan gramatikon kun okulfrapaj ekzemploj.

Profesoro VASSALLS, eksdekano de la Universitato de Tananarive, interesiĝis kaj petis informojn kaj klarigojn.

Profesoro OLAH TIBOR, de la Universitato de Budapeŝto, informis, post la prelego, S-ron LLECH-WALTER, ke se li ne interesiĝis antaŭe pri esperanto estas ĉar la esperantistoj en Budapeŝto prezentas esperanton kiel anstataŭiganton de ĉiuj lingvoj. La delegito de U.E.A. en Perpignan klarigis al Profesoro TIBOR, ke kontraŭe esperanto estas helplingvo kaj faciligas la lernadon de la aliaj lingvoj.

S-ro LLECH-WALTER disdonis multajn flugfoliojn kaj eĉ lernolibrojn kaj ankaŭ numerojn de "Espéranto-Actualités", eldonitaj de Franca-Unio.

A.V.

UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO
4 bis rue de la Cerisaie
75004 PARIS

BIBLIOGRAPHIE DE BASE POUR INFORMER LE PUBLIC FRANCOPHONE

a- travail de base

- 1- lecture régulière des principaux organes d'information sur l'espéranto et sa diffusion: "Espéranto", "Heroldo de Esperanto".
- 2- lecture régulière du "Monde" avec de nombreux articles sur l'enseignement des langues et l'impérialisme linguistique.

Prendre des notes et classer par centre d'intérêt.

b- documents de travail

- 1- caractère sociologique de l'utilisation d'une langue
"L'espéranto (P. Janton, coll. Que sais-je N° 1511)
brochure Herteaux (Rougetet, édit. UFE)
rapports des séminaires organisés par TEJO (en français et esp^o~~eranto~~)
("Langue et culture", "langue et politique", "langue et société", "langue et décolonisation", "Pour la défense des langues africaines"
les commander chez KER de TEJO, Riouwstraat 1-72, NL Hago).
- 2- impérialisme linguistique
"Linguistique et colonialisme" (P.L Calvet, édit. Payot 1974)
"SUFOKO" (compilation d'articles de journaux avec trad. en esp^o
abonnement chez KER).
"Etnismo" (sur la situation des minorités ethniques dans le monde,
abonnement: Uwe Moritz, Feldstr. 38, D-519 STOLBERG 8).
- 3- enseignement des langues
Différentes revues à consulter dans les bibliothèques municipales
"Le Monde de l'Education"
"Le Français dans le Monde"
publications de Alliance Française, British Council, Ministère de l'Education etc...
- 4- coût de la traduction dans les instances internationales
"UN kaj ni" (édit. UEA)
- 5- histoire ou grammaire de l'espéranto (les commander chez UFE)
"Espéranto en perspektivo"
"ABC d'espéranto à l'usage de ceux qui aiment les lettres" Waringhien.
- 6- pour une argumentation actuelle
différents articles de C. Piron, édités à La Chaux de Fonds (CH)
par Kultura Centro Esperanto, dont "Confession d'un fou européen",
"L'espéranto, joyau éducatif méconnu" etc...
derniers numéros de "Espéranto-Actualité"
ouvrages scientifiques édités par SUK, BP 9, B-40000 LIEGE X
dépliants touristiques récents
Eùropaj Dokumentoj
Scienca Mondo
Pasporta Servo
Esperanto-dokumentoj (édit.UEA, abonnement chez UFE)
numéros de l'année de différentes revues en esp^o.

La secrétaire R. TRIOLLE, juillet 77.

MONDCIVITANOJ AKCEPTAS ESPERANTON

KIEL NEUTRALAN LABORLINGVON

Tiu fakto ŝajnas ne esti demando por la regiono, sed efektive, kiel multaj el vi, jam Mondcivitanoj, scias tion, ĝi estas la rezulto de plurjarlonga agado de geVolpelière, kompreneble helpitaj de kelkaj amikoj.

Okazis en Parizo, komence de julio, la dua grava kongreso de la Mondcivitanoj. La organizantoj aranĝis samtempan interpretadon por 3 lingvoj: angla, franca kaj japana, por la plenaj kunsidoj.

Nia intenco, iom tro memfida, estis aranĝi ĝin ankaŭ por esperanto, por montri la utilecon de nia lingvo. Tio fiaskis, ĉar la MC esperantistoj de la landoj en kiuj neniu el la tri laborlingvoj estas parolata, ne enskribiĝis sufiĉe multnombre por pravigi la grandegan elspezon.

Tamen, ĉar en la komisionoj samtempa interpretado ne funkciis, tuj montriĝis la malfacilo de la interkomunikado, kaj dank'al la prezidantino de la komisiono por Edukado, amikino de ni, kaj novbakita esperantistino, subkomisiono por Esperanto estis starigita.

Ĝi konsistis el 13 E-istoj el 5 landoj, inter kiuj, S-ro Woessink, estrarano de U.E.A., oficiala reprezentanto de D-ro Tonkin en la kongreso kaj S-ino Woessink anino de la Mondfederaciista Movado.

Tiu subkomisiono verkis proponon, kiu, iom malplilongigita, estis aproĝita en la finaj plenaj kunsidoj de la kongreso de la MC kaj de tiu de la Mondfederaciistoj, kiu okazis ĝuste poste en la samaj lokoj.

Post la sukceso de Esperanto lastjare en la R.I.D.E.F. estas grava nova paŝo antaŭen de nia lingvo.

VIVO DE LA GRUPOJ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

Pro gravaj akcidentoj, tiu somera periodo tre malbone finiĝas por du el la aĝemaj anoj de nia grupo.

En septembro, Sandra, la sepjara filineto de nia sindonema presisto, Roberto Frus, dum libertempo en Italio estis renversita de motociklisto kaj ŝi suferis pro krania rompo. Feliĉe laŭ lastaj informoj, ĉiu danĝera estas nun for, kaj la gepatroj povis revenigi la infanon, kiu resaniĝas en Nimo.

Aliparte, fine de aŭgusto, nia kasistino F-ino M.L. Rolle estis tre serioze vundita dum aŭtoakcidento.

Krom cerba skuo, kiu feliĉe nun malaperas, ŝi suferas pro profundaj vundoj de la vizaĝo kaj pro pluraj ostrompoj kaj la kuracistoj opinias, ke ŝi devos resti almenaŭ tri monatojn en hospitalo.

Ni kore deziras, por tiuj du akcidentitoj rapidan kaj plenan resaniĝon.





Iom da historio...

La Grande Motte havas tute simplan historion, ĉar ĝi estos en 1976... nur 10 jara!

Iam, la spaco okupata de aktuala Grande Motte dependis de la Graf-flando de Melgueil, vasta bieno de vinberecoj, lagetoj, marĉoj, situanta sur la komunumo de Mauguio.

Tiu marĉa regiono estis infestita de moskitoj, neloĝebla kaj tute ne ekspluatita loko.

La oficiala plano por la turisma aranĝo de Langvedoko-Rusiljona marbordo (Aménagement touristique du littoral Languedoc-Roussillon) programis 5 turismajn unuojn, inter ili tiun de La Grande Motte laŭ vasta kvinkilometra sablorando.

«Estis necese, skribas Jean Balladur, ĉefarkitekto, estigi novan urbon en pejzaĝo, kies karakteroj estis ĝia ebeneco, ĝiaj marĉoj kaj ĝia manko da vegetaĵoj. Estis do necese — almenaŭ mi tiel pensis — krei artefarite novan pejzaĝon, kaj per tio, imagi sufiĉe imponajn konstruaĵojn super la grundo. Kial piramidoj?»

Tute simple, ĉar mi volis eviti la konstruadon de betonaj blokoj, kiuj estus agresaj pro siaj geometriaj linioj. La piramido tre bone integriĝas al pejzaĝo; plie ĝi havis avantaĝon: doni sur almenaŭ du el siaj facoj multajn balkonojn je ĉiuj etaĝoj kaj tute malfermatajn sur la lumo de la mara spaco. Alia avantaĝo: ili estas en regiono kelkfoje forblovata, rimarkindaj ekranoj, kiel interplektitaj ekranoj, kiuj haltigas atmosferajn perturbojn».

La Grande Motte ricevis sian nomon pro la plej alta duno el tiu regiono (5 m alta), kies supraĵo ebligis la topografiajn mezurojn por la realigo de la unuaj laboroj. Ĉe la piedo de tiu duno etendiĝas «Le point Zéro» (Punkto Nulo), loko de trankvila promenado.

Dum kelkaj jaroj La Grande Motte estis grandega konstrukampo, kies gruoj staris super plugita, fosita kaj truita grundo. Oni devis plialtigi je 2 metroj super la maro, la nivelon de la tereno, kio necesigis 5 000.000 m³ da tero. Iom post iom desegniĝis la vizaĝo de la nova urbo. Ni redonu la parolon al Jean Balladur: «Unue en La

LA GRANDE MOTTE

Grande Motte, mi volis imagi kaj krei urbon, kiu havos sian propran vivon. Kie ĝi povis vivi pli bone ol ĉirkaŭ la haveno?» Fakte La Grande Motte unue naskiĝis antaŭ 8 jaroj apud la plezurhaveno per 2 piramidoj; la haveno estas unu inter la plej grandaj kaj modernaj el Eŭropo, kun 1000 lokoj por ŝipetoj. Poste kolektivaj konstruaĵoj kun diversaj komercoj multobliĝis, dum la plaĝo estis organizita inter la haveno kaj la enfluejo de Vidourle. Notu ke betonaj formoj, diversaj kaj kuriozaj verkoj de skulptistino J. Chevry, klopodas reteni kaj konservi dunojn kaj samtempe elvokas, mi ne scias kiun malaperintan civilizacion.

La zono de kampadejoj estas vera urbo kun 4200 lokoj por tendoj, ĉiuj sub ombro de grandaj arboj. Norde de la vojo, kiu kondukas al Grau du Roi etendiĝas la kvartalo de individuaj vilaoj kaŝitaj en verda kreskaĵo. Ne malproksime V V F (Village-Vacance-Famille) estas tre moderna feria centro kie okazos la nacia kongreso. V V F estas konstruita sur artefarita insulo, meze de la lageto Ponant; ĝi estis kreita por ricevi ĉiutage 2200 libertempulojn. Ĝi konsistas el 3 vilaĝetoj de dometoj, 3 konstruaĵoj de individuaj loĝejoj, centraj pavilonoj (restoracio, kafejo, ludejoj, bubvartejo, oficejoj...).

Ni ne forlasu La Grande Motte antaŭ ol paroli pri arkitekta kaj astronomia kuriozaĵo: la ponteto por piedirantoj imagita de Jean Balladur: ĝi similas mezepokan pordegon kaj havas astronomian proprajn: la angulo, kaj dimensioj de malsupra kaj supra elipsoj estis kalkulitaj por ke ilia projekcio sur la ferdeko estu perfekta cirklo la 24-an de junio, je la 12-a horo, tiel estas, la tagon de la somera solstico kaj de Sankta Johano.

Konklude, La Grande Motte, oni ŝatas aŭ ne, sed oni devas veni por vidi ĝin kaj memori, ke en 1966, antaŭ nur 10 jaroj, oni komencis nur terplenigi la marĉojn.

... Post 10 jaroj La Grande Motte estos verda oazo.

S. HUMM.



FERVOJISTA JARKUNVENO EN LA GRANDE MOTTE

Kunveno de fervojistoj E-istoj en la Grande Motte: 1-AN kaj 2-an de oktobro. Sabaton vespere je la 21a. Dimanĉa ekskurso: La Grande Motte je la 8a horo, Sète je la naŭa, vizito de la ostrobredejoj, gustumado de ostroj.

Bankedo en familia domo "Lazaret" je la 12a kaj 1/2, vizito de St Clair, Mara Tombejo (15) - Frontignan, gustumado de vino (17 1/2). Reveno en la Grande Motte. Prezo 75 Fr.

Oni povas partopreni la tutan ekskurson aŭ nur parton.

Petu informojn pri la precizaj lokoj al:

S-ino HUMM, 357, Chemin des Neuf Peyres - 84000 - Avignon (ĝis la 25a/9).

Maison de l'A.T.C. Allée des Jardins - 34280 - La Grande Motte, post la 25/9.

AUTUNA KUNVENO

DE LA FEDERACIA KOMITATO

Kiel decidite okazos ^{le} nia pasinta kongreso en Nîmo la aŭtuna renkonto por laborplanoj okazos denove

dimanĉo 16-an de oktobro

en Sète, ĉe "Centre Familial du Lazaret" strato Bretagne. Urbaj aŭtobusoj, el stacidomo iras ĝis la placo E. Herriot.

La komuna tagmanĝo kostos 25,00 fr.. Estos necese nur sendi antaŭ la 10-an de oktobro la liston de la interesuloj al D-ino VIERNE Yvette, 5, rue Dr Roux, 34000 Montpellier.

La kunveno okazos je la 9,30 h. akurate, la tagordo diskutos pri varbkampanio kaj kompreneble pri diversaj demandoj kaj sugestoj.

Ronéotypé pour la Fédération d'ESPERANTO Languedoc-Roussillon

Directeur de la publication: Roberto FRUS - Ecole Maternelle E. Vaillant II - Z.U.P. — 30000 NIMES

Dépot Légal: 3^{me} Trimestre 1977